## ĈAPITRO VIII

### Kroketludo ĉe la Kera Damo

Ne malproksime de l' enirejo staris granda rozarbo; kreskis sur ĝi blankaj rozoj, sed jen tri ĝardenistoj okupis sin pentrante ilin ruĝaj. Ĉar tio ŝajnis al Alicio tre stranga ago, ŝi alproksimigis sin por observi ilin. Ĵus alvenante, ŝi aŭdis unu el ili diranta: "Kvin, vi gardu vin, vi jam ne ŝprucu sur min la kolorilon."

"Mi ne povis ne" diris Kvin malafable. "Sep ŝancelis al mi la kubuton." Sep rigardis supren kaj diris: "Jen ĝuste vi, Kvin; ĉiam vi kulpigas la kunulojn."

"*Vi*, Sep, *vi* ne kuraĝu paroli!" re-diris Kvin. "Nur hieraŭ mi aŭdis la Damon diranta ke vi meritas esti senkapigita."

"Pro kia kulpo do?" demandis la unue parolinta.

"Tio ne estas *via* afero, Du" diris Sep.

"Gi nepre estas lia" asertis Kvin "kaj mi volonte sciigas al li: la kulpo estas ke Sep alportis al la kuiristo tuliptuberojn anstataŭ bulboj."





Sep pasie deĵetis sian broso
" Nu, el ĉiuj maljustaj aferoj—
Sed en tiu momento li okaze
kiu staras apude observante
subigis lian koleron, la alia
serĉante la kaŭzon de lia e
humile salutis ŝin.
"Ĉu vi afable volus diri al mi'
iom timeme "kial vi kolorigas
Kvin kaj Sep diris nenion,
rigardojn sur Du, kiu per tr
komencis: "Nu, Fraŭlino, la
jena arbo devis esti ruĝroza, ka
blankrozan. Se la Damo elt
ekzekutigus nin ĉiujn. Sekve,
laŭeble por ke, antaŭ ol ŝi alve
En tiu momento Kvin, kiu
vizaĝo konstante rigardadis tr
ekkriis: "Jen la Damo, jen la
La tri ĝardenistoj tuj ĵetis s
sur la ventroj. Alicio ekaŭd
multaj piedpaŝoj, kaj alriga
fortan ekscitecon kaj fortan
Damon.
Unue marŝis dek soldatoj, ki
tiuj soldatoj havis platajn re
formojn—same kiel la tri ĝa
manoj kaj piedoj apud la kvar
dek korteganoj; tiuj ĉi estis c

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST